ROK XXIV.
LIPIEC 1930.
N-r 7.

JARO XXIV.
JULIO 1930.
N-o 7.

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Kraków. Reĝa kastelo vidata flanke de Wisła (Visŭa).

# ESPERANTYSTA POLSKI
# POLA ESPERANTISTO

WYDAWCY: ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID TADEUSZ HODAKOWSKI REDAKTANTOJ

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.— Konto Pocztowej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.
Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

**WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!**

**Atentu!** Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado".
Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—
Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Instruisto de Korpuso de Kadetoj deziras korespondadi kun sam- kaj eksterlandanoj,

**PROF. B. RADZIMIŃSKI,**
**CHEŁMNO, POMORZE. POLUJO.**

TREŚĆ — ENHAVO:

**DR. SZCZĘSNY WACHHOLZ:** ĜENERALAJ SCIIGOJ PRI KRAKÓW. **PASTRO DRO TADEUSZ KRUSZYŃSKI:** HISTORIA SKIZO PRI KRAKÓW. **HELENA D' ABANCOURT:** ARKITEKTURO MONDANA KAJ PREĜEJA DE KRAKÓW. **FELIKS KOPERA:** SKULPARTO, PENTRARTO KAJ MUZEOJ EN KRAKÓW. **HELENA D' ABANCOURT:** SCIENCAJ KAJ KULTURAJ INSTITUCIOJ EN KRAKÓW.

**POLLANDA KRONIKO. TRADUKA KONKURSO. I. DRATWER:** PRI LA STRATO DE ZAMENHOF. **IV. TUTPOLA KONGRESO DE ESPERANTO. KSIĘGA ADRESOWA ESPERANTYSTÓW POLSKI. EL LA GAZETARO. RICEVITAJ GAZETOJ.**

# POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE.

# ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

ROK XXIV JARO | KRAKÓW LIPIEC 1930 JULIO | Nr 7 N-o

Laŭ la propono de Internacia Centra Komitato Krakova Urbestraro invitis venontan Universalan Kongreson de Esperanto en 1931 al Kraków. Atendante la decidon de la ĝenerala Kongresa Kunsido la Redakcio de Pola Esperantisto eldonas specialan Nron priskribantan historion de Kraków kaj ĝiajn vidindaĵojn.

La Redakcio.

## ĜENERALAJ SCIIGOJ PRI KRAKÓW.

Kraków, iama ĉefurbo de pola respubliko, unu el plej antikvaj, kaj koncerne arton unu el plej belaj polaj urboj kuŝas ĉe Wisła (Visŭa — Vistulo) en sud-okcidenta parto de la ŝtato. Jam la geografia situo mem super granda kaj ŝipirebla rivero, ĉirkaŭaĵo de parte arbarumitaj, nekutime pitoreskaj kaj laŭ geologia vidpunkto tre interesaj altaĵoj kreas eksterajn kondiĉojn, pro kiaj nur malmultaj urboj en meza Eŭropo povas fieri.

Kraków kiel eksa, dum kelkaj jarcentoj ĉefurbo kaj kronadurbo de polaj reĝoj posedas krom belegaj romanaj, gotikaj, renesancaj ktp. konstruaĵoj grandiozan reĝan kastelon „Wawel", kuŝigitan sur la altaĵo reganta super la urbo. Kun Wawel'a kastelo ligas sin plej belaj tradicioj tiel de iama ŝtato kiel poste de periodo de mallibereco. Komencinte de mitoj propraj al ĉiu antaŭhistoria homa sidejo, pri princo Krak, venkinto de legenda Wawel'a drako kaj fondinto de la urbo Kraków, preninta sian nomon de tiu de la princo, pri reĝino Wanda, kiu oferis sian vivon por bono de sia popolo, preferante morti en profundoj de Wisła ol fordoni sin kaj sian landon al fremduloj, tra tempoj de plej granda disfloro de iama pola kulturo dum regado de Jagellona dinastio, ĝis la nuna momento estas Kraków lulilo kaj sidejo de kulturo kaj nacia spirito. Tiu urbo organizis aŭ partoprenis ĉiujn preskaŭ liberigajn movadojn en jarcentoj XVIII ĝis XX. Kraków vidis konfederacianojn de Bar, vidis heroan faron de estro Tadeusz Kościuszko formaŝinta el Kraków al batalo kun rusa invadinto, Kraków pere partoprenis en la insurekcio de j. 1830, kaj senpere en tiuj de jaroj 1846 kaj 1863. El Kraków elmarŝis komandate de Józef Piłsudski polaj legioj en 1914 j.

Tiuj aktoj pruvantaj pri vigleco de neniam estingiĝanta nacia spirito kaj patriotismo de loĝantaro de la urbo, faras el Kraków specon de pola Piemonto, kaj ĝiaj monumentoj de pasinteco kun la men-

ciita sublima nacia tradicio nedissîreble kunligitaj, specon de pola Romo, multe vizitata de ekskursoj kaj turistoj tiel enlandaj kiel eksterlandaj. Ĉirkaŭ pli ol 50 preĝejoj devenantaj el diversaj tempperiodoj kaj estantaj veraj perloj de preĝeja arkitekturo, kiel preĝejoj de S-ta Mario, Patroj Franciskanoj, Dominikanoj, de S-ta Kruco, Adalberto, Marko ktp., posedas Kraków aron da grandiozaj mondanaj konstruaĵoj, kiel altiĝantaj sur la grandega ĉefplaco Sukiennice (Draphaloj), plie domegoj de antikva Jagellona Universitato, metropolitan palacon, urbodomon ktp. Krom publikaj konstruaĵoj tuta vico da palacoj kaj privataj domoj kuŝigitaj en malnova urboparto, ĉirkaŭitaj parte de mezepokaj fortikaĵoj, unikatoj de sia speco (barbikano) povas ravi en plena signifo de tiu vorto ĉiun tiel pro sia ekstera aspekto, kiel pro arkitekturo de internoj.

Apartan tuton formas la jam menciita reĝa kastelo sur Wawel'a altaĵo. Tiu ĉi kastelo, kiun aŭstraj okupintoj ŝanĝis je hospitalo kaj soldataj kazernoj, nun estas rekonstruata, redonante al ĝi ĝiajn antaŭan historian brilon. Krom grandioza, renesanca arkada kortego, verko de Bartolomeo Berecci, admiras tie vizitanto majestoplenajn ĉambregojn de iamaj reĝoj kaj polan Forum Romanum en formo de kapelo de S-taj Felicito kaj Adaŭkto el X jrc., ruinojn de malnova romana katedralo ktp. En subteraĵoj de Wawel'a katedralo, ripozas restaĵoj de polaj reĝoj kaj spiritaj kondukantoj de la nacio, kiel de Tadeusz Kościuszko, princo Józef Poniatowski, poetoj-profetoj Adam Mickiewicz kaj Juljusz Słowacki. Mistika karaktero de Wawel, kiel simbolo de spirito kaj nacia kulturo inspiris grandan poeton Stanisław Wyspiański al ege emocia kaj unika en sia speco dramo s. t. „Akropolis".

Nuntempa Kraków nombranta nune ĉ. 215.000 loĝantaron laŭ vidpunkto politik-administracia estas aŭtonomia urbo, bazita sur propra statuto kun prezidanto, kiel estro de ekzekutiva povo, kaj kun urbkonsilantaro, kiel organo voĉdona kaj kontrola. Estrate de la urbo oni gvidas multajn entreprenojn kaj instituciojn kontentigantajn ĉefajn bezonojn de la loĝantaro, kiel elektro- kaj gasproduktejojn, brutbuĉejon, bakejon, glacifabrikon, sapofabrikon ktp. Tiuj uzinoj starigitaj parte sur tre alta nivelo, tiel, ke ili povas esti modelo por tiuspeca administracio en aliaj urboj, estas nun parte plikonstruataj pro rimarkinda kresko de la loĝantaro kaj ĝiaj bezonoj. Ĉiuokaze ili sufiĉas por la bezonoj de la loĝantaro en relative granda mezuro por plej malaltaj prezoj.

La nuntempa urbo Kraków estas sidejo, simile kiel en pli fruaj tempoj, de plejparte el privataj fondoj riĉe dotitaj sciencaj institucioj, havantaj honegajn gvidantojn. La institucioj faras Krakow'on medio de spirita elito tiel el sfero de ekzakta scienco, kiel ankaŭ de arto. Sufiĉas rimarkigi, ke preskaŭ ĉiuj fluoj kaj agordoj en tiuj fakoj naskiĝis kaj naskiĝas ĝis la hodiaŭa tago en muroj de Kraków. El Kraków ankaŭ devenas la plej grandaj eminentuloj sciencaj kaj artistaj ne esceptante scenarton. La urbo Kraków estis naskurbo de ĉefulo de pola pentrarto, Jan Matejko, naskurbo de unu el plej grandaj niaj poetoj, dramverkistoj kaj pentristoj, kiu estis Stanisław Wyspiański. En Kraków ankaŭ ĉiam restadis antaŭ nelonge mortinta majstro de pola pentrarto Jacek Malczewski.

Ĉiuj ĉi faktoroj impresas eksterordinare forte, ĉar kvazaŭ ensorĉitaj en plastikan formon de monumentoj de arto altrudas sin senpere al okulo kun nekutima ekspresio, kaj de tie al la animo de vizitanta la urbon turisto, postlasante neniel forviŝeblan specifan stampon. Arigitaj sur kompare malgranda spaco vere netakseblaj monumentoj tiel arkitekturaj kiel el sfero de plastika arto en multaj muzeoj, placoj kaj stratoj, scipovas seninterrompe veki estetikan scivolon de la vizitanta turisto.

Najbara ĉirkaŭaĵo de Kraków abundas je eksterordinare pitoreskaj ekskursejoj, kiel valo de Ojców, Czerna, Bielany ktp., ĝi posedas romantikajn ruinojn, kiel Tyniec kun ruinoj de antikva monaĥejo de Benediktanoj, kaj Tęczynek kun ruinoj de kavalira kastelo. Pli fora regiono de Kraków jen kuŝigitaj sur la tereno de Krakow'a vojevodio konataj kaj laŭ kuraca valoro unuarangaj ban- kaj kuraclokoj, kiel Szczawnica, Krynica, Żegiestów, Rabka ktp. Sur la tereno de la sama vojevodio kuŝas t. n. somera ĉefurbo de Polujo, Zakopane, ĉe piedoj de karpata zono de granitaj Tatroj, poste Czorsztyn kun ruinoj de kastelo kaj Pieniny-montoj — kun breĉo de rivero tra ĉenon de Karpatoj.

Proksimaj kaj pli foraj ĉirkaŭaĵoj de Kraków abundas je riĉaj minejoj. Kaj jen en senpera najbareco de Kraków troviĝas ekspluatataj jam dum tempoj de iama Respubliko pola salminejoj en Wieliczka, Bochnia, krome estintaj plumbo- kaj arĝentominejoj en Olkusz. Sur la tereno de tiu vojevodio oni faras serĉadojn de nafto kronitajn parte per tre prosperaj rezultoj (Krosno). Fine troviĝas ankaŭ sur la tereno de tiu ĉi vojevodio eksterordinare riĉaj karbokuŝejoj formantaj sub nomo de Krakow'a minejteritorio unu tuton kun minejteritorio suprasilezia. **Dr. Szczęsny Wachholz,** docento de Jag. Univ.

# HISTORIA SKIZO PRI KRAKÓW.

Unuajn sciigojn pri Kraków (elp. Krakuv) donas Ibrahim-Ibn-Jakob, ĉirkaŭ la jaro 962, kaj post li Abu-Obaid-al-Bekri el Cordova en 1066 kaj historiisto Kosmas el Praha en 999. Pli belaj, kaj ĉiam pli interesaj ol historio, legendoj diras, ke fondinto estis potenca Krak, kiu mem, aŭ eble helpe de siaj kunuloj mortigis teruregan drakon, loĝantan en la kaverno sur la monto Wawel (Wavel), kie la princo Krak konstruis unuan kastelon. Filino de Krak, Wanda (Vanda), lia heredantino, fama pro beleco malakceptis sinsvatadon de germana princo Rüdiger, kaj kiam tiu ĉi minacis per milito, ne volante endanĝerigi sian popolon, ĵetis sin en profundojn de Wisła (Visŭa — Vistulo). Apude de Kraków, post Wisła oni montras memormonteton de Krak, kaj, 8 km fore, tombomonteton de Wanda, en la loko, en kiu oni trovis ŝian korpon. Bolesław la Brava (Bolesŭav), aranĝante en j. 1000 kune kun imperiestro Otto III, komisiite de papo, dividon de Polujo je episkopaj provincoj, fondis episkopejon en Kraków. Trovitaj en j. 1917 sub la Wawel'a kastelo postsignoj de antikva preĝejo, devenas sendube de la katedralo de la Brava. Potenco de tiu reĝo ne daŭris longe, ĉar dum la regado de Mieszko (Mjeŝko) II detruis ĝin eksteraj malamikoj kaj idolana kontraŭago.

Restarigis ĝin Kazimierz la Renoviginto (Kazimjeĵ), kiu rekonstruis la urbon Kraków, plifortigis ree Bolesław la Kuraĝa, sed lia krimo pienumita kontraŭ S-ta Stanisław senigis lin de reĝa titolo, tiel ke lia frato kaj sekvanto Władysław Herman (Vŭadisŭav) loĝis precipe en Płock. Divido de Polujo je princlandoj donitaj al filoj, kion testamentis Bolesław la Kurbebuŝa, kun kondiĉo, ke la plej aĝa el la familio devas posedi krakovan regionon kaj esti estro super aliaj, antaŭdestinis por Kraków rajtojn de poluja ĉefurbo. Tiu ĉi divido dispecigis kaj malfortigis Polujon, kaj senhomigis ĝin terurega invado de Tataroj, kiuj forbruligis Krakow'on en j. 1241, tiel ke sukcesis defendi sin nur la kastelo sur Wawel kaj parto de la urbo pli fortikigita, ĉe la ĝis nun staranta preĝejo de S-ta Andreo. Bolesław la Hontema, volante reloĝigi la urbon, eldonis en j. 1257 privilegion de loĝado laŭ oportunaj por koloniistoj kondiĉoj, metante tiel fundamentojn al brileco de Kraków. Plejparton de Polujo unuigis Władysław Łokietek (Ŭokjetek), kiu en 1306 donis grandan privilegion por la urbo, donante hodiaŭan blazonon. Sendankaj urbanoj perfidis la bonan princon, kaj post trankviligo de la ribelo Łokietek iom modestigis iliajn rajtojn. En j. 1320 Łokietek estis kronata en la katedralo sur Wawel, kies novan konstruaĵon en gotika stilo, sur la loko de antaŭa romano preĝejo oni komencis en tiu sama jaro. En j. 1325 okazis sur Wawel edziĝa festo de Kazimierz, filo de Łokietek, kun Aldona, filino de litova princo Gedymin, kiu donis la unuan komencon por alproksimiĝo de Litovujo al Polujo. Kazimierz, nomita poste la Granda, kiu sekvis post morto de la patro en 1333 plifortigis Polujon kaj enkondukis en ĝi bonan mastrumadon, kaj la konata diro, ke li ricevis Polujon lignan, kaj lasis muran, klarigas, ke dank' al li ekestis kasteloj kaj urboj konstruitaj el ŝtonoj. Dum lia regado kreiĝis aparta gotika stilo krakova, brikŝtona, kun aliaj ol aliloke konstruadaj principoj. En j. 1358 tiu ĉi reĝo fondis sur la krakova kastelo plej superan juĝejon por urba juro, malpermesante apeladon al juĝejo en Magdeburg. En j. 1363 la imperiestro Karlo IV edziĝis en Kraków kun pomerania princino, nepino de Kazimierz, kaj por alvenintaj gastoj la urbano Wierzynek (Vieĵinek) preparis eksterordinare riĉan regalon. Kraków etis tiutempe komercista ligilo inter Oriento kaj Flandrujo, Baltiko kaj Vieno respektive Buda. En j. 1364 fondis Kazimierz la Granda Universitaton en Kraków, la kvaran en la mondo. En 1370 post la senida reĝo sekvis Ludoviko, reĝo de Hungarujo, el familio de Anjou, kaj kvankam li malofte en Polujo estadis, por Kraków estis favora, ĉar por certigi al si subtenon flanke de la ĉefurbo koncerne la heredon de siaj filinoj, donadis al ĝi privilegiojn. Lin sekvis lia filino Jadwiga (Jadviga), kiun jam dum ŝia vivo oni konsideris sankta. Tiu ĉi farinte oferon de sia koro, donis sian manon al Władysław Jagiełło (Jagjeŭŭo), ligante per amo kaj ne per milito, Litovujon kun Polujo. Kraków vidis bapton de nova reĝo, edziĝon kaj kronadon. En j. 1399 eldonis Jagiełło nekutiman tiutempe privilegion, permesantan al krakovaj urbanoj aĉeti bienojn en la tuta ŝtato. En j. 1400 renovigis tiu reĝo kaj pligrandigis la universitaton, uzante destinitan por tio heredaĵon post Jadwiga. Depost duono de XV ĝis fino de XVI jrc. Polujo staris sur supro de potenco, sekve ankaŭ la cefurbo tiam pleje disvolviĝis. Humanistaj

fluoj estis jam fortaj dum tempoj de Kazimierz Jagiellończyk (Jagjellonjĉik), filo de Jagiełło, kaj tial depost j. 1501 oni komencis alikonstrui la Wawel'an kastelon en renesanca stilo, sed la arto kaj kulturo ekfluis vastege depost j. 1515, kiam la plej juna el filoj de Kazimierz Jagiellończyk, Zygmunt I prenis kiel edzinon princinon de Bari, Bona Sforza. En j. 1525 faris al la reĝo homagion sur la ĉefplaco en Kraków Albrecht de Brandenburg, la lasta granda ĉefo de krucordenanoj, kaj la unua prusa princo. En j. 1539 oni donis al krakovaj urbanoj plenajn nobelulajn rajtojn. En j. 1548 sekvis post Zygmunt I, lia filo Zygmunt August, kiu restadis ĉefe en Litovujo, kio ne estis utila por la ĉefurbo, tamen li daŭre kunligis Litovujon kun Polujo, per Unio en Lublin en 1569 por ambaŭflanka profito. Post morto de tiu reĝo en 1572 kaj mallonga regado de Henriko de Valois, sekvis dekjara brila regado de Stefan Batory. Tiu ĉi reĝo en j. 1583 aprobis daŭran poŝtan trafikon, aranĝitan de familio de Montelupi inter Kraków, Venezia kaj Wilno. En tiu ĉi jaro oni festis en la ĉefurbo eksterordinare solene edziniĝon de la reĝa nevino, Grizelda Batory kun la potenca kanceliero Jan Zamojski. Sekvanto de Zygmunt III translokis en j. 1609 la ĉefurbon al Warszawa, kaj per sia hezita kaj nelerta politiko kaŭzis grandajn fendojn en forta ankoraŭ domego de pola ŝtato. Dum la regado de lia dua filo kaj sekvanto, Jan Kazimierz, teruran dezertigon kaŭzis Svedoj en Kraków, sieĝante ĝin en j. 1655. Helan momenton vidis ankoraŭ Kraków en j. 1683, kiam Sobieski envojiĝis de tie por defendi Vienon, poste venis malĝojaj tagoj de dezertigoj pro bataloj de August II kun Karlo XII Sveda, poste mallongan ĝojon insurekcio*) de Kościuszko (Koscjuŝko), eniro de princo Józef Poniatowski (Ponjatofski) kun polaj kaj napoleonaj soldatoj, kaj plue lian de tie foriron post malfeliĉa militiro kontraŭ Moskvo al lia lasta batalo ĉe Leipzig. Viena kongreso faris Krakovon libera urbo kun la distrikto, kiu daŭris ĝis la okupo de Aŭstrio en j. 1846. En j. 1848 liberigaj movadoj kaŭzis bombardadon de aŭstroj, kaj la konstitucio en j. 1867 donis novan eblon por la disvolviĝo. El Kraków formarŝis al batalo polaj legioj komandate de Józef Piłsudski (Pilsucki) en 1914, kaj Kraków la unua en Polujo deĵetis la fremdan regadon, liberigante sin jam la 31-an de oktobro en j. 1918.

**Pastro Dro Tadeusz Kruszyński.**

# ARKITEKTURO MONDANA KAJ PREĜEJA DE KRAKÓW.

Polujo, kaj en ĝi Kraków, estis kruciĝejo de diversaj ideoj fluantaj de Oriento al Okcidento — ni inklinadis kaj fine ni estas inklinintaj al Okcidento kaj ĝia kulturo — pro tio en formoj de stilo ni vidas firman superregon de Okcidento, kaj kiel ĝis nun ŝajnis senkonkuran.

Arkitekturaj monumentoj de Kraków, same preĝejaj kiel mondanaj, ne estas esprimo de homogena stilo, sed, pli ol aliloke, prezen-

*) Insurekcio estas liberiga batalo.

tas miksaĵon de stiloj, formas organismojn, pruvantajn pri sekvo de diversaj stilecaj formoj, kiuj en ili kompletiĝadis — ne malofte ankaŭ stila formo celis kunligi tuton en unu arkitektece harmonian esprimon.

Ĝis antaŭ nelonge ni opiniis la plej malnova formo de konstruado en Kraków restaĵojn de romana arkitekturo, dume lastaj tempoj alportis al ni tiurilate neatendatan malkovron. Sur Wawel oni elfosis en parto kie iam ekzistis reĝaj kuirejoj koncentran konstruaĵon, alcentrokuran — preĝejeton de S-taj Felikso kaj Adaŭkto en orienta bizantia aŭ armena stilo (la esploroj ankoraŭ ne estas fiksitaj) de IX aŭ X jrc. Tiu ĉi preĝejeto troviĝanta 4 metrojn sub la hodiaŭa nivelo, estas konstruita el malgrandaj ŝtonplatetoj sur horizontala projekcio de kvarobla trifolio t. e. de cirklo kun kvar absidoj. Tiu ĉi malkovro pliriĉigas krakovajn monumentojn per unu plia specimeno de orienta formo kaj laŭaĝe plej antikva.

Plej bone konservitaj monumentoj en romana stilo estas antaŭ ĉio preĝejo de S-ta Andreo ĉe Grodzka (Grocka) strato, fondita en j. 1000. Ĝi estas unu el specimenoj de defendaj preĝejoj kun embrazuroj. Du turoj okflankaj ĉe la pinto finas la konstruaĵon, ĝemelaj fenestroj estas karakterizaj por tiu stilo. Starante iame ekster muroj en tiel nomata „kastela ĉeurbo" ĝi sukcesis kontraŭstari tataran invadon en j. 1241.

El aliaj romanaj restaĵoj tie kaj ie dissemitaj ni nomos kripton de S-ta Leonardo sur Wawel, en kiu romana altaro estas projektita de Viollet le Duc. Krome ni havas parton de norda portalo en preĝejeto de S-ta Adalberto sur la ĉeurbo, ruinojn de la plej malnova katedralo de Bolesław trovita proksime de katedrala trezorejo. Ĝi estas trinava sanktejo; konserviĝis partoj de altara tablo, kolonoj kun atikaj bazoj, karakterizaj romanaj kapiteloj kun plekt-ornamaĵo ktp. Ruinoj de tiu ĉi preĝejo estas viva ekzemplo kiel en ŝanĝiĝan laŭstile arkitekturan organismon eniĝas kaj enkreskas la nova. Tiu preĝejo detruita dum invado de Ĉeĥoj en 1039 estis aliformata verŝajne je kastela kapelo sub aŭspicio de S-ta Gereono. Dum tempoj de Kazimierz la Granda en XIV jrc. ĝi estis alikonstruata je kapelo gotika sub aŭspicio de S-ta Mario Egipta; konserviĝis de ĝi muroj de kvadrata navo, subplafona ĉielarko kun postsignoj de poliĥromio. Laŭvice ni vidas kiel ankaŭ tiu ĉi monumento en XVI jrc. estas englutita de arkitektura organismo de la kastelo.

Romanismo plejparte pereis dum invadoj kaj brulegoj — Kraków rekonstruiĝanta en XIV jrc. estigas sur romanaj fundamentoj gotikajn konstruaĵojn, kiuj ligas sin ĉe ni kun influo kaj aŭtoritato de Dominikanoj kaj Franciskanoj — komencas ilin Łokietek, tamen la plejparto de konstruaĵoj tiel preĝejaj kiel mondanaj ligas sin kun la nomo de Kazimierz la Granda.

Principo de preĝeja gotiko ne diferencas ĉe ni de okcidenta, tamen la lokaj cirkonstancoj influis je kelkaj ŝanĝoj, kiuj formas apartan karakteron de krakova gotiko.

En okcidenta gotiko por depezigi premon de meznava arkaĵo, oni transirigis super tegmentoj de flanknavoj rezistarkojn sur grandajn skarpojn ĉe ekstera muro de flankaj navoj — do internavaj fo-

stoj estante depezigitaj, povis esti malpli grandaj — tiuj pontoj etendiĝis ĉirkaŭ la preĝejo kvazaŭ per punta reto de turetoj, fialoj kaj pinakloj. Ne disponante tiel rezistan materialon kiel kampa granito ktp. ni serĉis solvon konvenan por briko — super muroj de flanknavoj oni konstruis skarpojn subtenantajn la ĉefan navon kaj defluantajn tra fostoj fortigantaj la arkaĵon — la fostoj verdire dikiĝintaj malheligas la internon, sed tio estas lerta kaj simpla solvo de la konstruo.

Arkadoj inernavaj estadas kutime plandesegnitaj sur la bazo de egalflanka triangulo.

La krakova gotiko enkondukas krom tio uzon de duobla materialo: briko kaj kvadroŝtono (sabloŝtono): la briko plenigas murojn, skarpojn ktp. — la kvadroŝtonon oni uzis por konstruaj partoj kaj ornamoj kiel fostoj, arkaĵaj ripoj, kornicoj, ĉemuraj apogiloj, rozetadoj, borderoj ktp. — eksteraj brikoj metitaj plejparte alterne laŭ sia longo kaj larĝo, kun kolora variado, ĉar fruntoj de brikoj ofte estas nigraj, la longaj flankoj ruĝaj. En pola sistemo, aŭ tiel nomata venda, estas metataj alterne unu frunto kaj du longaj flankoj. Tipaj monumentoj de gotiko ĉe ni estas preĝejo de S-ta Mario, katedralo sur Wawel, preĝejo de S-ta Kruco kun belega palma arkaĵo apogita sur unu kolono enmeze, preĝejo de S-ta Dikorpo kaj tuta vico da preĝejoj kun flankaj galerioj kiel preĝejo de S-ta Katarino, Dominikanoj kaj Franciskanoj.

El domoj urbanaj de gotika epoko de laŭ-tradicie profunda konstru-maniero, mallarĝa fasado du aŭ trifenestra, grandvestibla restis malmulte. Ili estas videblaj ĉe la ĉefplaco, plejparte alikonstruitaj, pruvas nur per detaloj pri antikveco de ĉefa muraro; jen kaj jen ni vidas erojn de portaloj, pordokadroj, gotikajn arkaĵojn inter formoj de alia stilo, kiel ĉe Florjańska strato 30, gotika pordego kaj samaj portaloj ĉe Szpitalna str. n-ro 8, 17 ktp. Oni provizis ilin per blazonoj kiel baziliskoj, leonoj, el kiuj kelkaj ĝis nun rezerviĝis sur Grodzka, Szpitalna (Ŝpitalna) stratoj ktp. En t. n. „Hetmana domo" ĉe la ĉefplaco sub n-ro 17 en iama monfarejo, kie nun troviĝas banka kontoro, konserviĝis salono kun gotika arkaĵo el tempoj de Kazimierz la Granda kun surarkaĵaj ornamoj prezentantaj portreton de lia edzino Adelajda.

En XVI jrc. disfloras ĉe ni arkitekturo de Renesanco sub influo de rilatoj kun Italoj. Signalon por tio donas la kortego; iniciatinto estis la reĝo Zygmunt la Maljuna, patrono de l' arto kaj subtila konanto.

Sur Wawel oni devas serĉi pramodelon de renesancaj konstruaĵoj preĝejaj kaj mondanaj. En j. 1502 Zygmunt la Maljuna entreprenas rekonstruon de la kastelo plejparte forbrulinta — ĉefmurojn kaj gotikajn partojn oni restigis — en kelkaj detaloj kreiĝis formoj intermezaj, gotikaj kunplektiĝis kun renesancaj. La kortego ĉirkaŭita de arkadoj kaj kolonaro fariĝis tipo por multaj palacoj kaj domoj. Sude estis renesancaj konstruaĵoj kovritaj per plataj tegmentoj — ĉe ni specifan karakteron donas tegmento pinta, alta, kaŭzita de klimataj kondiĉoj — ĝi apogas sin per ligna trabaro sur lignaj nedikaj kolonetoj, kies kapiteloj kronitaj estas per speco de korbeto tipa en Krakow'a renesanco.

La plej pura tipo de preĝeja renesanco estas Zygmunt'a kapelo alcentrokure konstruita, verko de italo B. Berecci. Kupolo ornamita per kasetonoj kun cent kelkdeko da rozetoj, kies formoj estas ĉiuj malsamaj. Muroj diversigitaj per stiuko kun groteska ornamaĵo.

Tipo de disflorinta renesanco transiranta al baroko estas preĝejo de S-ta Petro kun kupolo sur kruciĝo de navoj, kaj kun navoj kun barela arkaĵo — fasado dividita per kornicoj je kondignacioj (etaĝoj), ornamitaj per niĉoj kaj skulptaĵoj.

En mondana arkitekturo en XVI jrc. oni prenis modelon el la kastelo — la idealo palaca estis interna kortego kun arkada loĝio sur la unua etaĝo; al interno de brilaj salonoj, ofte kovritaj per trabornamajoj kaj kasetonoj, kondukas belega ŝtuparto interrompita de podestoj. Portaloj estas ĉirkaŭitaj de arko plenigita per kasetonoj. Videbliĝas sur ili ofte diversaj surskriboj, kiel sur prelata domo ĉe Maria placo, en domoj ĉe Kanonicza str., ĉi tie estas ankaŭ citinda palaco Krzysztofory.

Konformiĝante al brilaj, larĝaj konstruaĵoj de Renesanco, alifarante mallarĝajn antaŭajn domojn, interligante ilin kun si per unu fasado, por kovri pintajn tegmentojn, frunte turnitaj al fronto, oni konstruis ĉirkaŭe dekoraciajn murojn, nomitajn atiko, variigitaj per niĉoj kaj finitaj per punto el S-linioj, maskoj, globoj ktp. Enkonduko de atiko al Sukiennice (draphaloj) meze de XVI jrc. sanktigas tiun formon kaj disvastigas — ni vidas ĝin sur „Griza domo" ĉe la ĉefplaco kaj sur multaj aliaj domoj.

En multaj portaloj (el kiuj ĝenerale kaŭze de alikonstruadoj ĝisdaŭris el diversaj stiloj apenaŭ dekkelko), ni vidas ofte profilon de gotikaj pordokadroj, kronitan per kornico renesanca en harmonia akordiĝo, kiel multaj pordokadroj sur Wawel, en vestibloj de domoj sub n-roj 5, 7 ĉe Florjańska strato ktp.

El renesancaj palacoj oni devas citi palacon de familio Wielopolski (Magistraton), kortojn el Kanonicza strato ktp.

Krom multaj Italoj, artistoj kaj arkitektoj, kiel Bart. Berecci, Castiglione, Padovano il Mosca ktp. jam agis ankaŭ Poloj, kiel Słoński, Michałowicz el Urzędów ktp. (Sŭonjski, Miĥaŭoviĉ — Ujenduf).

Parolante pri renesanca arkitekturo estas neeble preterpasi monumentojn de militara arkitekturo, kiuj ĝisdaŭris kiel restaĵoj de defenda muro kun kvar bastionoj kaj barbikano.

Unua bastiono ĉe Szpitalna str., konstruita el desegnohava briko, glazurita, apartenis al korporacio de pasamentistoj, la dua ĉe Florjańska str. al peltistoj, tria al lignaĵistoj, kvara al ĉarpentistoj. En j. 1626 tiaj bastionoj, defendataj de korporacioj estis 56. Oni detruis ilin escepte de kvar, supre menciitaj, komence de XIX jrc., kaj iaman fortikaĵan fosaĵon de la urbo oni ŝanĝis je promenejo nomita nun Planty. Floriana bastiono estis fermata per tiel nomata erpilo, t. e. peza fera krado, horizontale mallevata en ŝtonaj kanelaĵoj, ĝis nun konservitaj. En arkaĵa trapasejo de la bastiono troviĝas altareto kun antikva bildo de Dipatrino, sur la etaĝo kapeleto en gotika stilo. Tegmento kaj ŝtona aglo estas moderna. Tuj ĉe la bastiono troviĝas t. n. barbikano aŭ kaserolo, nekutima monumento de fortikaĵa arkitekturo el XV jrc. en Eŭropo. Ĝi servis ne nur por defendo, sed ankaŭ por

kolektiĝado de l' urba garnizono antaŭ intencata ekskurso kontraŭ la sieĝanta malamiko.

La barbikano estis kunligita kun la Floriana bastiono per masonita koridoro. Komencojn de la muro oni vidas ĉe la Floriana pordego, levebla ponto estis transmetata super profunda foso, plenigata per la akvo el Rudawa. La ponto estis ligilo por la antaŭurbo nomata Kleparz. Parto de la kaserolo kun tria plej malalta vico de kanonaj paffendoj kuŝas nun sub nivelo de la strato. Estas vizitindaj tegmentitaj koridoroj sur la plej supera etaĝo, pendigitaj sur apogiloj, ornamitaj per sep, akre finiĝantaj turetoj. En tiuj koridoroj, al kiuj ni eniras per ekstera ŝtonŝtuparo, ni rimarkas supre embrazurojn, kaj malsupre truojn por verŝi varmegan peĉon kaj ĵeti ŝtonojn sur sieĝantan malamikon. Interne, flanke de korto, kuras ĉirkaŭ la konstruaĵo koridoro, servinta iam por priservi bombardilojn.

Esprimo, penanta atingi kiel eble plej grandan vivon kaj riĉon en detaloj, fariĝas baroko, elflorinta ĉe ni en dua duono de XVII jrc. el renesanco kaj uzanta ĝian konstruan formon. Tipo de baroka preĝejo — jen la preĝejo de S-ta Anna kun forte fleksitaj kornicoj kaj riĉa stuka ornamo de Baltazar Fontana interne, plue preĝejo de S-ta Floriano, Bernardanoj, preĝejo de Paŭlanoj sur Skałka (Skaŭka) ktp. La sama tipo de mondanaj konstruaĵoj: korto de palaco de familio Jabłonowski (Jabŭonofski) (hodiaŭ de grafoj Potocki), Bracka str. n-ro 2, ĉe angulo de la ĉefplaco, korto de „Collegium Juridicum", malnova universitato, hodiaŭ Instituto de Antropologio kun bela arkada korto en baroka stilo, plue portalo ĉe la strato de S-ta Johano n-ro 20 ktp. el fino de XVII kaj komenco de XVIII jrcj.

El rokoka stilo, kiu estas ofte tre ornama stilo ni citos beligitan ĉirkaŭe per la balustrado palacon de grafoj Stadnicki, ĉe Grodzka str. 40, kapelon de episkopo Grot sur Wawel ktp.

Fine de XVII kaj komence de XVIII jrcj. invadoj kaj rabadoj de malamikoj kaŭzis ruinon kaj kadukiĝon de multaj konstruaĵoj, kiujn por konservi oni devis plifortigi. Oni uzis por tio skarpojn, pli vere artefaritajn plifortigojn de la skarpo, alidire oni kovris per ili oblikve tutan horizontan muron, donante al ĝi oblikvan profilon, kiel domo de Studenta Kunloĝantejo ĉe Malgranda Ĉefplaco, hodiaŭ Jezuita Kolegio, kun eltranĉaĵo por fenestro — aŭ oni alkondukis ĝin ĝis teretaĝo (domo Gołębia str. 4) — aŭ oni subapogis en certaj distancoj per diverslarĝaj skarpoj (Malgranda Ĉefplaco 2, 3). Estadas ankaŭ skarpoj plifortigantaj domangulojn, kiel en Griza domo ĉe la Ĉefplaco — ili donas per siaj saltkornicoj kaj oblikveco originalan fizionomion — el sub tiuj skarpoj ne unu foje oni sukcesis malkovri ian malnovan aŭ renesancan portalon.

Fino de XVIII kaj komenco de XIX jrcj. alportas plifortigitan konstruan movadon kaj kun ĝi stilon de Ludoviko XVI kaj imperian — ambaŭ baziĝis sur principoj de antiko: la unua pli similas al baroko, ĝiaj postsignoj estas videblaj en ornamo el floraj aŭ fruktaj festonoj. Ĝia tipo: palacoj de Wodzicki (str. de S-ta Johano 11) kaj de princoj Jabłonowski (Ĉefplaco 20).

Stilo imperia proksimiĝante pli al antikva pramodelo evitas ornamaĵojn, aŭ adaptas ĝin en plej simpla formo: kolonoj, pilastroj, jo-

naj arkadoj, en kiuj estas veneciaj fenestroj, frizoj kun klasikaj motoj ktp. — ĝia monumento estas domo ĉe Szewska (Ŝefska) str. 9. Tiuj stiloj tre ofte kun si kunplektiĝadis, ke ofte ili estas ne apartigeblaj.

XIX jrc. alportanta plue nenian novan formon stilan, videbligas komprenon por malnovaj formoj, tial, precipe post terura brulego en j. 1850, porkonserva movado kaj rekonstrua disvolvas pli viglan agadon. Ĉi tie evidentiĝas agado de arkitekto Karlo Kremer (1812—1860).

En konstruaĵoj de novaj jaroj (1860—1870) estas rimarkinda stilo de klasika renesanco (Akademio de Sciencoj). Tiutempe agas arkitektoj: Feliks Księżarski (1820—1884), Filip Pokutyński (1829—1879), Tomasz Pryliński (1847—1895), poste Talowski, Zawiejski ktp. En postaj jaroj oni provis ĉiujn stilojn komencinte de romanismo tra gotiko kaj renesanco iom germana ĝis baroko. Ĉiu el arkitektoj pro prefero aŭ sento inkliniĝadis al tia aŭ alia stilformo. En lastaj tempoj post provizoraj, momentaj provoj de viena „Secesio", videbliĝas tendenco por akcenti polajn formojn kun kelka sufiĉe forta konsiderado de imperiaj formoj.

Porkonserva agado, kvankam aktiva kontraŭ fiinklinoj de profitemaj detruuloj, ofte ne havas eblon savi valorajn malaperantajn monumentojn; refleksmove ĝi ŝajnas serĉi en la pasinteco tradician ligilon por moderna, pli nova pola stilesprimo aŭ formojn pli novajn, simplajn bazitajn sur interrilato de unuj masoj al aliaj kaj de tiuj al fenestro- kaj pordotruoj. **Helena D' Abancourt.**

# SKULPTARTO, PENTRARTO KAJ MUZEOJ EN KRAKÓW.

## SKULPTARTO.

Simile kiel arkitekturo samtiel skulptarto disvolviĝadis en Polujo de XI jrc. ĝis lastaj tempoj. Tamen el la plej frua epoko, nome la romana restis nur fragmentoj troviĝantaj en kripto de katedrala preĝejo sur Wawel, krome fragmentoj dislokitaj en tiu ĉi katedralo kaj en kolektoj de Nacia Muzeo en Kraków. Kompleta romana portalo konserviĝis nur en preĝejo de Norbertaninoj en antaŭurbo Zwierzyniec.

Gotika epoko alportis disfloron de la skulparto. En XIV jrc. oni ornamis per belaj skulptaĵoj preĝejon de S-ta Mario, enkondukante karakterizajn por tiu epoko fantaziplenajn figurajn skulptaĵojn kaj samkune tre belan plantan ornamentadon. Skulptaĵoj de tiu epoko ornamas volboŝtonojn de la katedrala preĝejo, krome tiujn en domo t. n. „hetmana", (Ĉefplaco n-ro 17), murtabletojn de katedrala trezorejo kaj ĝian portalon, el kiu restis nur fragmentoj. Ĉi ĉiuj skulptaĵoj havas multe da simileco al skulpartoj ĉeĥa kaj franca de tiu epoko. Al tiu grupo de skulptaĵoj apartenas ankaŭ ĉefportalo de Dominikana preĝejo, kiun beligas riĉaj ornamaĵoj figuraj, plantaj kaj bestaj.

Krom tiu ĉi skulptaĵo en ŝtono konserviĝis el XIV jrc. tuta vico da skulptistaj verkoj. Al ili apartenas relikvejoj el la preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj, kaj troviĝantaj nun en kabineto de arthistorio ĉe Jagello-




Biblioteko de Jagellona Universitato.



Fragmento de rega kastelo.



Barbakano kaj Floriana pordego maldekstre.



Memormonteto de Kościuszko.



Kapelo de Zygmunt en la katedralo.



Parto de Ĉefa Placo kun preĝejo de S-ta Mario.



Parto de Ĉefa Placo kun Draphaloj.



Monumento de rego Władysław Jagiełło.

na Universitato, krucifikso de la reĝino Jadwiga en la katedralo sur Wawel kaj tuta serio da madonoj en Muzeo Nacia en Kraków, estas sendube la verko de tiutempaj skulptistoj en Kraków. Estas ankaŭ menciindaj figuretoj de Dipatrino kaj de S-ta Jozefo, apartenintaj iam al la marionetoj de preĝejo de S-ta Andreo, per kiuj oni prezentis Kristnaskon. Ili devenas el dua duono de XIV jrc., kaj donacis ilin reĝino Elizabeto, filino de Łokietek, fratino de Kazimierz la Granda kaj edzino de Karlo Roberto, hungara reĝo.

Ornamo de Kraków estas multaj monumentoj sur reĝaj tomboj, kaj troviĝantaj en la katedralo sur Wawel. La plej frua el ili estas monumento de la reĝo Władysław Łokietek. Kvankam tiu ĉi sarkofago iom similas al tiu de Henriko, princo de Wrocław (= Breslau) kaj Kraków en la preĝejo de S-ta Kruco en Wrocław, kaj ankaŭ al sarkofago en preĝejo de S-ta Wit en Praha, malgraŭ tio nekutima estas skulptaĵo de kapo de tiu ĉi reĝo plena de realismo kaj samtempe de ideala karakterizo de tiu grava eminentulo. Sur la monumento la skulptisto prezentis figurojn de priplorantinoj dolorantaj post morto de la reĝo.

Multe pli ornamita, pli riĉa estas sarkofago de Kazimierz la Granda farita parte el ruĝa marmoro, parte el sabloŝtono. La reĝon prezentis skulptisto kuŝanta sub belega gotika baldakeno, kaj la tumbon*) ornamas sidantaj figuroj de ŝtataj gravuloj malesperantaj pro perdo de la reĝo. Influo de franca gotiko estas ĉi tie facile rimarkebla.

Tria sarkofago estas tiu de reĝo Władysław Jagiełło. Sur marmora tumbo ni vidas imponan figuron de la reĝo kun bonege skulptita kapo. Sur la tumbo apogitaj je blazonoj de polaj regionoj sidas plenaj de malĝojo kaj malespero ŝtatuloj. Ĉe malsupro de la tumbo elskulptis artisto hundojn kaj falkojn. La origina baldakeno ne ĝisdaŭris la nunajn tempojn, ĉar la nun ekzistanta devenas el XVI jrc.

Plej disvolvita, plej riĉe pritraktata kaj farita kun plej granda arteco estas sarkofago prezentanta sur la tumbo reĝon Kazimierz Jagiellończyk, verko de Wit Stwosz. Tipo de mezepoka sarkofago estas ĉi tie konservita en tuta pleneco. Sur la tumbo la skulptisto prezentis same malesperantajn gravulojn post morto de la reĝo kaj apogitaj al ŝildo, sed la dramo atingis ĉi tie kulminacian punkton. Kapo de la reĝo estas farita kun granda realismo kaj eksterordinara detalemo.

Wit Stwosz estas aŭtoro de brila altaro en preĝejo de S-ta Mario. Li finis tiun verkon post dekdu jaroj de laboro en 1489 j. Stwosz elskulptis en meza sceno endormiĝon de S-ta Mario, kaj sur aloj scenojn el vivo de Kristo kaj de Dipatrino. La altaro sur fono de vitrajoj el XIV jrc. kaj inter gotika arkitekturo de presbiterejo lerte polihromita de Jan Matejko faras grandan impreson. Mezepoka realismo ligas sin ĉi tie kun idealismo kaj profunda kredo de mezjarcentoj. La verkon de la skulptisto kompletigis la pentristo per polihromio. La preĝejo de S-ta Mario posedas krome du ĉefverkojn de tiu artisto, ambaŭ krucifiksojn, unu ŝtonan, la alian lignan. Tiuj krucifiksoj mirigas tiel pro teknika realigo kiel pro pleneco de profunde penetra

*) Tumbo = ĉerkosimila tombo.

kompreno por reprodukti dolorplenan kaj malgraŭ tio belan vizaĝon de Kristo. Krom tio Kraków posedas tutan vicon da aliaj verkoj inter kolektoj de Muzeo Nacia. El ili precipan atenton meritas Kristo en Olivĝardeno farita el ŝtono. Estas neeble citi ĉiujn skulptverkojn de gotika periodo disigitajn en preĝejoj kaj muzeoj...

Antaŭ la fino de XV kaj unuaj jaroj de XVI jrcj oni ornamis Krakow'on per brilaj tomboplataĵoj fanditaj el bronzo de Petro Fischer en Nürnberg. La plej belaj el tiuj bronzaj skulptaĵoj estas: sarkofago de Kallimach, konata humanisto, fandita laŭ modelo de Wit Stwosz kaj troviĝanta en preĝejo de patroj Dominikanoj en Kraków, krome monumento de Piotr Kmita en la katedralo kaj monumentoj de Salomonoj en preĝejo de S-ta Mario, fine sarkofago de kardinalo Fryderyk Jagiellończyk en la katedralo, parte ankoraŭ gotika en sia pli malnova parto, en sia pli nova traktata kiel konveksreliefo, jam verko de renesanco.

Epoko de renesanco enkondukis belegan skulptan dekoracion en Zygmunt'a kapelo ĉe la katedralo, faritan de Giovanni Cini el Siena en jaroj de 1519 ĝis 1530. Skulptisto, Jan Maria Mosca Padovano verkis sarkofagan monumenton por la reĝo Zygmunt I., granda meceno de renesanca periodo en Polujo. Kun tiu sarkofago komenciĝas tuta vico da tre belaj renesancaj sarkofagaj en Kraków, el kiuj la plej belaj estas verko de Padovano, Cini kaj Michałowicz el Urzędów. Verko de tiu lasta artisto estas bela monumento de episkopo Padniewski en la katedralo, distingiĝanta per originala alifaro de arkitekturaj formoj de renesanca periodo. Sur verkoj de renesanco en Polujo signiĝis influoj ĉefe italaj poste influoj de renesancoj flandra kaj germana. Destrukcion de renesanca stilo enportas Santo Gucci, la verkinto de monumento de Stefan Batory en la Krakow'a katedralo. El verkoj de renesanco ŝanĝiĝanta je baroko estas menciindaj monumentoj de Montelupi familioj kaj Celari en preĝejo de S-ta Mario.

Baroko en frua epoko havis siajn verkintojn en italaj artistoj kiel Ridolfi, Castellani kaj aliaj multaj italaj artistoj, kiuj venis Polujon el la regiono de Lugano.

El epoko de baroko, posta epoko, plej belajn verkojn postlasis fratoj Fontana Baltazaro kaj Francisko el Como. Iliaj belaj skulptaĵoj estas rigardeblaj en preĝejo de S-ta Anna kaj en salono de domo sub n-ro 1 ĉe Szczepańska strato. Fino de XVII jrc. kaj jarcento XVIII estas tempo de kadukeco de Kraków, el kiu nur dua duono de XIX jrc. kaj XX jrc. levis la skulptarton sur altan nivelon verkoj de Gadomski, Guyski, Madeyski, Laszczka, Dunikowski, Rygier, Weloński, Wójtowicz, Szymanowski kaj multaj aliaj.

## PENTRARTO.

Sur la tereno de mezepoka pentrarto de plej frua periodo posedas Kraków multajn libregojn ornamitajn per miniaturoj komencinte de XI jrc. Precipe riĉa je tiuj restaĵoj estas arkivo de la Krakow'a katedralo, biblioteko de princoj Czartoryski kaj Biblioteko Jagellona. Ĉiujn tiujn tendencojn, kiujn oni renkontas eksterlande, oni rimarkas en tiuj libregoj. En unua duono de XIV jrc. aperas mondanaj pentristoj liverantaj bildojn al Krakow'aj preĝejoj. Pleje signiĝis en tiu pe-

riodo influoj de ĉeĥa pentrarto, kaj pruvas pri tio bildoj en Nacia Muzeo en Kraków kaj Madonoj en preĝejo de Dikorpo. Reĝo Władysław Jagiełło, kiu edukiĝis en brilo kaj lukso de orienta kaj bizantia kulturoj venigis al Kraków rusajn pentristojn, kiuj pentris ikonojn kaj ankaŭ poliĥromis preĝejojn, kapelojn kaj reĝan rezidejon sur Wawel. Krom tio en la preĝejo de S-ta Mario oni pentris en okcidenta stilo. Da restaĵoj de poliĥromio tiel okcidenta kiel ankaŭ orienta depost XIV ĝis komenco de XV jrc. preskaŭ neniom konserviĝis, ĝisdaŭris nin nur murpentraĵo de Świętokrzyska (sanktokruca) kapelo en la katedralo sur Wawel, devenanta el fino de XV jrc., kaj estanta kvazaŭ lasta ekbrilo de rusa pentrarto bizantia en Polujo. Mezepokaj freskoj en stilo de okcidenta arto ornamas koridorojn de preĝejoj de Dominikanoj, Franciskanoj, Aŭgustianoj kaj de S-ta Kruco.

Krom poliĥromio disvolviĝadis vitraĵa pentrarto, kaj belaj monumentoj de tiu arto el XIV kaj XV jrc. estas belaj vitraĵoj en preĝejo de S-ta Mario kaj en tiu de Patroj Dominikanoj.

Tre abunde kaj riĉe disvolviĝas korporacia pentrarto, post kiu konserviĝis belaj restaĵoj, kiujn oni povas vidi en Krakow'a Muzeo Nacia, en preĝejo de S-ta Katarino, en preĝejo de S-ta Kruco, Muzeo de princoj Czartoryski, katedrala preĝejo sur Wawel kaj en preĝejo de S-ta Nikolao. Tiu korporacia pentrarto disvolviĝas dum tuta XVI jrc. kaj cedas al influoj de renesanco.

La renesanco eniĝas al pola pentrarto per germanaj artistoj. Sur fronton eliĝas frato de Albrecht Dürer, Hans Dürer, kies verko estas bildoj en Muzeo Nacia, en la katedralo sur Wawel kaj parte konserviĝinta poliĥromio de la kastelo sur Wawel. Krom li eminentan agadon disvolvis konata pentristo Hans Sues el Kulmbach, kies verko estas belaj bildoj prezentantaj scenojn el vivo de S-ta Johano Baptisto kaj el vivo de S-ta Katarino en la preĝejo de S-ta Mario en Kraków. Ĉe finkliniĝo de XV kaj komence de XVI jrc. aperas Krakow'aj pentristoj, el kiuj Adam el Lublin verkanta en Kraków pentras grandajn triptikojn por la provinco, kaj Stanisław el Kraków ne nur pentras porkadrajn bildojn, sed antaŭ ĉio ornamas preĝejajn koridorojn en Mogiła, en monaĥejo de Patroj Aŭgustianoj kaj Franciskanoj, daŭrigante laborojn de mezepokaj pentristoj.

Eminente disvolviĝas en XVI jrc. miniatura pentrarto, kies ĉefa kreinto estis ĵus nomita Stanisław el Kraków. Certe li ilustris kodekson de Baltazar Beher en Jagellona Biblioteko. Krom kartoj kun statutoj de korporacioj li pentris scenojn prezentantajn laborojn de metiistoj en alt-arta maniero. Certe li ankaŭ ornamis per miniaturoj t. n. pontifikalon de Erazm Ciołek, en kiu li prezentis okupojn de pastraro.

El germanaj artistoj oni devas mencii ankoraŭ Miĥaelon Lentz el Kitzingen, kiu ekloĝinte en Kraków en unua duono de XVI jrc. disvolvis viglan agadon.

Germano estis ankaŭ Martin Kober el Wrocław (Breslau), kiu estis kortega pentristo reĝa kaj postlasis tre belan portreton de reĝo Stefan Batory, troviĝanta en preĝejo de Patroj Misiistoj en Kraków.

Fine de XVI kaj XVII jrcj. evidentiĝas influoj de itala pentrarto, kaj precipe venecia. El Kraków devenas artistoj kaj disvolvas aga-

don eksterlande. Tiel Teofil Polak edukiĝinte en Kraków eklogis en Tirolo kaj lasis tie multajn verkojn, precipe en Trident. El Kraków ankaŭ devenas Jan Ziarnko, kiu depost 1598 j. verkis en Francujo, kie gravuris belajn gravuraĵojn presitajn en laborejo de le Clerc. Plej multajn tamen verkojn lasis en Kraków Tomaso Dollabella. Liaj verkoj, bedaŭrinde alipentritaj, troviĝas en preĝejo de Dominikanoj.

Plentalenta religia pentristo de XVII jrc. estis Krakow'ano, Bernard Francisko Leksycki. Li pentris grandegajn tolojn ĉefe sub influo de flamandaj artistoj. Liaj verkoj troviĝas en preĝejo de Pp. Bernardanoj. Alia pentristo de XVII jrc. Jan Trzycki, disĉiplo de Nikolao Poussen kaj holandaj pentristoj postlasis al ni siajn verkojn, kiuj ornamas Jagellonan Universitaton kaj preĝejon de S-ta Floriano. Talenta artisto estis Daniel Frecherus, pentristo de portretoj kaj aŭtoro de portreto de episkopo Trzebicki en preĝejo de Pp. Franciskanoj. Pentrarto de dua duono de XVII jrc. plej bone respeguliĝas en pentraĵoj de preĝejo de S-ta Anna. Ni trovas ĉi tie verkojn de Karlo Dankwart — svedo, Innocento Monti kaj Paŭlo Paganini — italoj, kaj Georgo Eleuter Siemiginowski — polo.

Plej eminenta reprezentanto de religia pentrarto en Polujo en XVIII rjc. estis Szymon Czechowicz (1689—1775), eklektiko, laboranta sub influo de Karlo Marata. Liaj verkoj ornamas preĝejon de Patroj Piaristoj, tiujn de S-ta Anna kaj S-ta Floriano. Krom Czechowicz laboras en la sama direkto Tadeusz Konicz aŭ Kuntze (1695—1758). Verkoj de tiu pentristo tre memorigas naturon, kaj troviĝas en la preĝejo de Pp. Misiistoj en la kvartalo Stradom.

Ĉe finkliniĝo de XVIII kaj komenco de XIX jrcj. havis Kraków pentriston Michał Stachowicz, kiu kvankam ne posedis eminentan edukon, pentris tiutempan vivon de Kraków, kiel: jurpromeson de Kościuszko sur la Krakow'a ĉefplaco, enveturon de princo Józef Poniatowski al Kraków ktp.

Moderna direkto komenciĝas per agado de Michał Stattler, kiu al Krakow'a belarta lernejo enkondukis instruadon de pentrarto bazitan sur okcidentaj modeloj. Komencas aperadi de nun eminentaj pentristoj. Precipe Piotr Michałowski akiris rekonon en Francujo kaj postlasis bonegajn studojn troviĝantan en Muzeo Nacia. El la belarta lernejo eliras eminentaj pentristoj, kiel: Gryglewski — pentristo de internoj, Kotsis, kiu pentras scenojn el vivo de popolo, plenajn de sento. En Kraków eklogas bonega pentristo de antikva pola vivo, Juljusz Kossak, kuraĝa kaj lerta akvarelisto. Post Michałowski li estas la plej bona pentristo de ĉevaloj.

Historian pentrarton disvolvis Simmler kaj Rodakowski, ambaŭ krom tio eminentaj portretistoj, precipe tiuj de Rodakowski akiradis por li plej altajn distingojn eksterlande, kaj oni povas ilin admiri en Muzeo Nacia en Kraków. Krakow'ano estis Jan Matejko, kies geniaj verkoj, inspirataj de amo al patrujo prezentis al pola socio vivon de la nacio en epoko de sendependeco. Liaj verkoj distingiĝas per bonega tekniko kaj altaj artaj valoroj. Oni povas ilin admiri en Muzeo Nacia kaj en Domo de Matejko (Florjańska str. 41), kie la artisto vivis kaj kiu estas ŝanĝita je Muzeo. Verko de Matejko estas ankaŭ polihromaĵo en preĝejo de S-ta Mario. El belarta lernejo en Kraków de-

venas ankaŭ eminenta pentristo, Artur Grottger, kies verkado estis ankaŭ inspirata de amo al la patrujo, kaj precipe tragikaj efektoj de insurekcio en j. 1863. La verkojn de tiu artisto oni povas rigardi en Muzeo Nacia. El eminentaj Krakow'aj artistoj oni devas citi Widold'on Pruszkowski, kiu scipovis reprodukti poezion de pola vilaĝo, Maŭric'on Gottlieb, bonegan portretiston kaj Kazimiron Pochwalski, profesoron de belarta akademio en Wien, kies agado forte ligas sin kun Kraków. Kolorriĉon de pola vilaĝo kaj belon de vilaĝa vivo reproduktas Włodzimierz Tetmajer. Unu el plej grandaj polaj artistoj Juljan Fałat, bonega pentristo de pola pejzaĝo kaj vivo sur pola tero, longtempe restadis en Kraków kiel profesoro kaj direktoro de belarta lernejo. Leon Wyczółkowski ankaŭ unu el plej grandaj polaj artistoj, unuaranga koloristo, dotita de ĉiuflanka talento, kaj ankaŭ Stanisław Wyspiański, poeto kaj pentristo estas kiel artistoj kaŭzo de fiero por Kraków. Verko de Wyspiański, kiu meritas apartan atenton estas vitraĵoj en preĝejo de Pp. Franciskanoj. Sekvaj anoj de brila plejado de artistoj jen: Jacek Malczewski, verkinto de bonegaj komponoj, fantazi- kaj poeziplenaj, Teodor Axentowicz, Jan Stanisławski, Józef Mehoffer kaj multaj aliaj.

## MUZEOJ.

Kraków estas la urbo, kiu ankaŭ en muzeoj respegulas brilon de pola kulturo depost plej malnovaj tempoj. Sur la unua loko paŝas Muzeo Nacia, konsistanta el kelkaj departementoj. En Sukiennice en belaj salonegoj oni lokis galerion de pola nacia arto, kaj en ĝi ĉefverkojn de plej eminentaj polaj pentristoj. Volante ekkoni verkaron de pola pentrarto depost mezepoka jarcento komencinte, ĝis plej novaj aperoj, oni devas tien iri. Muzeo je nomo de Emeryk grafo Hutten-Czapski entenas monumentojn de malnova pola arto, de artindustrio depost plej maljunaj tempoj, kaj precipe la plej grandan en Polujo, plej bone ordigitan kaj plej alireblan por studoj kolekton da polaj moneroj kaj medaloj, kaj ankaŭ kolekton da gravuroj kaj malnovaj polaj presaĵoj. En urbodoma turo sur Krakow'a ĉefplaco oni lokis monumentojn de mezepoka pola skulptarto kaj inter ili tre belan verkon de Wit Stwosz: Kristo en Olivĝardeno. Kolekto je nomo de Feliks Jasieński entenas en si ksilografaĵojn japanajn kaj monumentojn de malproksima oriento, kaj ankaŭ riĉan kolekton da polaj zonoj. Kolektoj de Erazm Barącz (Karmelicka str. 51) entenas interesajn specimenojn de antikvaj tapiŝoj, teksaĵoj kaj armilaro.

Muzeo de princoj Czartoryski enhavas brilajn verkojn de fremda arto, inter ili faman portreton de Cecilia Gallerani, verko de Leonardo da Vinci, portreton de juna virino, verko de Rafaell, pejzaĝon de Rembrandt, specimenojn de diversaj pentro-skoloj, kaj multajn unuarangajn verkojn de artindustrio el diversaj epokoj kaj diversaj landoj.

Urba muzeo industria posedas belajn specimenojn de pola kaj fremda artindustrioj kaj disvolvas eminentan agadon en sfero de disvolvado de artindustrio kaj metio.

Etnografia muzeo sur Wawel posedas riĉajn kolektojn de popola verkaro el tuta Polujo kaj precipe tiujn el Krakow'a regiono.

**Feliks Kopera**, direktoro de Muzeo Nacia.

# SCIENCAJ KAJ KULTURAJ INSTITUCIOJ EN KRAKÓW.

Kraków pro naturo de sia situo estis kaj estas sinteza punkto por ĉiuj teroj de Polujo, kaj kiel troviĝanta okcidente ĝi fariĝas natura perulo por ideoj de tie al ni kurantaj. Memorante tempojn de ora periodo, ĝi estis post dispartigo de Polujo kaj dum persekutado de Poloj fortikigaĵo por ĝia spirita kaj kultura tuto kaj Mekka, al kiu pilgrimis individuoj de faro kaj penso.

Krom multaj elementaj lernejoj, ok gimnazioj por knaboj kaj ses inaj, kelkaj instruistaj seminarioj, industriaj lernejoj, ni havas aron da superaj sciencaj institutoj kiel Jagellona Universitato, unu el plej malnovaj en Eŭropo, ĉar fondita en j. 1364 kaj fieranta havi inter siaj lernantoj tiajn scienculojn kiel historiisto Długosz (Dŭugoŝ) kaj mondkonata astronomo Nikolao Kopernik. La universitato ampleksanta fakultatojn: teologian, juran, filozofian, medicinan kaj agronomian, krom multaj laborejoj kaj kabinetoj interligas multajn institutojn disvolvantajn memstare vastan agadon, kiel Institutoj Pedagogia, Geografia, Slava kaj ekzakte kun la universitato kunligitan Lernejon de Polikaj Sciencoj. Post restarigo de Polujo, Kraków kune kun Lwów havigis al novaj universitatoj polaj necesajn scienculojn.

Krom la universitato Kraków posedas ministan akademion, akademion de belartoj, superan komercan instituton, komercistan akademion, superan industrian lernejon, lernejon por artindustrio. Pure sciencan agadon disvolvas Pola Akademio de Sciencoj ekestinta en j. 1872 el antaŭa scienca societo en Kraków. Dividita laŭ fakultatoj ĝi disvastigas viglan agadon tiel esploran kiel eldonan kaj plenumas eksterlande devojn de oficiala reprezentantaro de pola scienco. Kraków posedas kelkajn muzeojn, el kiuj la plej granda estas muzeo nacia kun diversaj fakoj, krome muzeon de princoj Czartoryski (cz = ĉ). En Kraków troviĝas multaj sciencaj asocioj kiel: historia, filozofia, matematika, naturscienca, asocio de historiistoj de artoj, tiu de literaturistoj, ĵurnalistoj, de amantoj de pola lingvo, ligo de bibliotekistoj, asocio de libroamantoj, numizmatikoj, asocioj landkonema, geografia, asocio de popollernejoj, pedagogia, asocio por protekti monumentojn de pasinteco, asocio de amikoj de nacia muzea, asocio de belartoj, de amantoj de Kraków, ĝenerala asocio de polaj artistoj, „hejma arto", asocio de inteligentularo, socia klubo, teozofia ligo, ligo metapsika kaj multaj, multaj aliaj. Estas ankaŭ multaj virinaj asocioj kiel: Nacia organizo de Polinoj, katolika ligo de Polinoj, virina ligo, rondo de artistinoj kaj literaturistinoj kaj multaj aliaj.

Kraków pro tuta sia agordo de antikvaj tradicioj kaj manko de grandurba trafiko estas pli taŭga ol aliaj urboj por intensa, koncentrita laboro de l' spirito kaj penso.

**Helena d'Abancourt.**

# POLLANDA KRONIKO.

**CHORZÓW ŚLĄSK.** Fondiĝis grupo sub nomo Societo „Esperanto" kun 27 membroj. — La Estraro konsistas el S-roj: prezidanto — K. Czaja, vicprez. — J. Panczek, sekr. — W. Staniek, kas. — T. Bywaletz, bibl. — Fr. Panczek.

**KATOWICE.** Ligo Esperantista aranĝis 29. 5. komunan ekskurson al la ĉirkaŭajo de Mysłowice. Krom la sileziaj Esp. grupoj partoprenis ankaŭ la ekskurson la esperantistaro el Zagłębie Dąbrowskie. Entute ĉeestis ĉ. 60 p.

La 6. 7. aranĝis la Ligo ekskurson al Zagłębie Dąbrowskie. Ĉe la alveno de la Silezianoj en Będzin-Miasto je la 8.15 h mat. bonvenigis nin la Esp. Delegitaro de Zagł. Dąbr. Nombrante pli ol 60 p. kaj provizitaj per Esp. flagetoj ni promenis tra la urbo, vizitis la kunvenejon de la loka Esp. grupo kaj la historian kastelruinon de la 13-a jrc., kie S-ano Rozen kaj unu S-ano urbdeputito klarigis al ni la historion de la kastelo kaj la evoluiĝon de la urbo kaj kiel signon de simpatio al la silezia esperantistaro transdonis al la ligprezidanto (S-ano Kołodziej) albumon kun vidaĵoj de la kastelo nuna kaj restaŭrigota. Post mallonga ripozo sur la kastelmontelo ni veturis per tramo al Dąbrowa Górnicza, kie grandiĝis nia anaro ĝis pli ol 80 p.

Unue ni vizitis la publikan legejon kun ĝia lektorejo, kie nin bonvenigis la UEA-delegito S-ano Rabenda kun 2 membroj de la lektorejestraro kaj same kiel signon de simpatio transdonis al la ligprezidanto belan poŝtkartalbumon de la industriurbo.

S-anoj B. Czechowski kaj Kołodziej dankis per mallongaj vortoj al la UEA-delegito kaj lektorejestraranoj por la gastameco kaj menciis, ke Esperanto estas tio, kio interfratigas la homojn, do Esperanto fariĝas vera beno de l' homaro. Nun sekvis la vizito de la moderne aranĝita kaj tre interesa infanlegejo, ekzistantaj nur tri de tia speco en Polujo. En la korto de la legeja konstruaĵo okazis komuna fotografado de la ekskursanoj.

Tre interesa fariĝis nun la vizito de la Geologia muzeo kaj ties laboratorio, kie la dejorantaj oficistoj klarigis al ni ĉion detale. Post sufiĉa rigardado kaj aŭskultado ni alvenis ĝardenrestoracion, kie ĉiuj tagmanĝis. Kun freŝaj fortoj ni promenis al la Esperanta kverko ĉe la vilaĝo Piekło, kie ni alterne banis kaj ludis ĝis vesperiĝo.

Tio ĉi estis vere agrabla ekskurso, ke eĉ la ĉeestanta blindulo S-ano Kichel el Nowy Sącz kaj unu S-ano naturamanto el Varsovio, ano de konkordo ne povis ne esprimi sian ĝojon.

Nur tro frue venis la adiaŭo kaj kun „ĝis revido en Silezio" ni ekveturis hejmen. **E. K.**

**KRÓLEWSKA HUTA.** La 18. 5. okazis en Król. Huta, ul. Gimnazjalna 35 solena finiĝo de Esp. kurso por komencantoj (membroj de germ. soc. partio Wielkie Hajduki kaj sekcio de la Asocio por laborista klerigado). Ĉeestis ĉ. 60 p. inter ili gesamideanoj el Sosnowiec, Myslowice, Katowice k. a. lokoj. Paroladis: S-ro D-ro H. Boder pri „Signifo kaj strukturo de Esperanto", S-ro M. Kloss pri „Esperanto kaj la Esperantistaro", S-ano B. Czechowski pri „Esperanto kiel interfratigilo de l' homaro". Sekvis la publika ekzameno de la kursanoj antaŭ la ekzamena komisiono starigita de Ligo Esperantista. La kandidatoj ekzameniĝis: 6 kun „bona", 2 kun „sufiĉa" rezulto. La kursgvidinto S-ro E. Kołodziej enmanigis al la ekzamenitoj en la nomo de Ligo Esp. atestojn pri la farita ekzameno. Krome ricevis ĉiuj ekzamenitoj belajn premiojn. La faritaj paroladoj, kiuj okazis en Esperanto, pola kaj germana lingvoj, la ekzameno, kiel ankaŭ la kantado de la Himno Esp. k. a. Esp. kantoj faris grandan impreson je la neesperantista publiko. Kvankam la solena vespero estis aranĝita de la Asocio por laborista klerigado, ĝi fine aspektis kvazaŭ nura Esperanto-festo. Plibeligis la vesperon mandolinista orkestro kaj per dancado finiĝis la gaja vespero kaj kun ĝi la vintra sezono.

**SOSNOWIEC.** Laŭ zorgoj de Esperanto Delegitaro de Zagłębie, okazis en Popoldomo prelego sub titolo Esperanto en estonteco. Preleganto, ŝatata D-ro A. Ingster, antaŭ plena ĉambro da aŭskultantoj, precipe estraranoj grupaj, disvolvis sian ĉefpenson, pruvante ke esperanto certe venkos. Tamen de la esperantistaro dependas rapidigo de tiu ĉi venko.

Nia kreskanta movado bezonas ĉiam pli kaj pli da agantoj, kaj ilia nombro estas atingebla nur per konstanta, regula kunvenado kaj priparolado de la progresanta afero. Sen konstanta kunvenado ni staros senmarŝe.

Post la prelego okazis vigla disputo.

S-no Czechowski rimarkis, ke la movado esperanta estas granda, ke en la mondo neesperantista publiko kaj institucioj emas akcepti esperanton, ke la lingvo jam atingis unuajn provojn sufiĉe famajn, nur vasta uzado de la lingvo ne estas sufiĉe praktika pro nelerta uzado de esperanto flanke de esperantistoj mem.

Ĉu neesperantistoj povas montri la praktikecon de mondlingvo? Certe ne! La socioj kaj tuta homaro havas jam sufiĉe da propagandaj laŭdoj. Jam de longe venis tempo de propagando per lingvouzo. De tiu ĉi praktika mondskala uzado ankaŭ dependas, ĉu jam eklernintaj homoj fariĝos bonaj propagandistoj, ĉu denove esperanto-forgesintoj.

S-no Zauberman, substrekis neceson de pli sperta kaj ofta grupa kaj distrikta laboro.

Ĉiufeste okazas grupaj ekskursoj multnombraj.

**WARSZAWA.** Ĉe Juda Turista Klubo oni fondis gvidate de s-o redaktoro Oskar Berman Esperanto-Rondon, kiu celas disvastigadi konon de Esperanto inter anoj-turistoj.

# TRADUKA KONKURSO.

Oni prezentas ĉi tie solvon de la traduka konkurso, kiu aperis en marta n-ro de P. E. D.

1. Ne sentante min kulpa, mi apelis kontraŭ la maljusta verdikto. 2. Ĉar oni devas scii, ke ne konsiderante personajn malemojn inter la diskutantoj, kiuj ofte pelis ilin en tro akran malpacon, ambaŭ partioj distingiĝis per plej bona volo kaj kontraŭa aserto estas simpla malverajo. 3. Kiel tuto, la ekzameno donis bonan rezulton (estis sukcesa, sukcesis). 4. Malgraŭ ĉia penado, li ne sukcesis erarigi min. 5. Mi ne povis preni sur min tiun ĉi taskon, ĝi estis por mi tro malfacila. 6. Vanaj estas viaj klopodoj, ĉar ili rezultiĝos nenion. 7. Tiu ĉi kliko, en kiu malklereco estris, baldaŭ venigis al la societo ruinon. 8. La homamaso ektroviĝis sur vojdisiĝo kaj venkis la malbonaj instinktoj. 9. Senkonscie li fiksis la rigardon en tiun ĉi estingiĝantan vizaĝon tiel, ke li ne vidis kio okazas ĉirkaŭe. 10. Koncerne monon estas iom malcerte. 11. Jes, sed el tiu ĉi sumo multeton oni devas elspezi por diversaj aferoj. 12. Gardu vin kontraŭ li, ĉar li estas unuaranga fripono. 13. Nu, kaj kion vi diros pri tio, ke mi lasis al li nenian eliron. 14. En Zakopane estas unuaranga skisaltejo. 15. La salttabulo en la gimnastejo ebligas sufiĉe long(distanc)ajn saltojn. 16. Ne aĉetadu tie, ĉar li estas konata troprezigisto. 17. La atako estis lerta, sed mi rebatis (kontraŭbatis) ĝin. 18. La akaparuloj (-istoj) senkompate troprezigadis dum la milito. 19. Oni vokis lin al la ordo. 20. Mi petas la parolon. 21. Jen vidu, kio rezultas el kolera pasiiĝo! 22. Estas necese iri hodiaŭ por pagi. 23. En okazo de bezono ĉu vi scias kiel konduti? 24. Korupteco floris prosperege. 25. La vesto estas tute konforma al la staturo. 26. Sekve vi ŝuldos al mi precizege 20 zlotojn. 27. En la kapon de la maljuna sonorigisto venadis tiam kaj iam la penso, ke tio estas damnindaj (inferdevenaj) friponoj. 28. Senkompara, elkora oferemo forviŝis larmojn de tiu ĉi vera mizerularo. 29. Sienkiewicz estis nacia pledanto. 30. Niaj animoj ne malnobliĝis. 31. Estis tiel mallume, ke oni povus interpuŝiĝi vizaĝ-al-vizaĝe. 32. Kaj ili marŝis en drapkiteloj kun stangoj de lancsimile fiksitaj falĉiloj sur la ŝultroj. 33. Ho, estos malbone, mi ekpensis.

Neniu tradukis tute ĝuste. Plej bone s-oj Ho kaj Chmieliński, sed neniu premio estas ĉi foje aljuĝebla.

Solvo de la majmonata konkurso aperos en la n-ro septembra de P. E.

# PRI LA STRATO DE ZAMENHOF EN WARSZAWA.

„Batalado" pro la Zamenhofa strato en Warszawa daŭras jam delonge. Sed ne helpis la diversaj petoj de la kunvenoj, organizajoj kaj kongresoj esperantistaj. Estis necesa granda publika demonstracio por la strato Zamenhofa en nia ĉefurbo. Ankaŭ la ĉiutagaj sukcesoj de nia movado instigis la Akademian Esperantistan Rondon ĉe J. A. H. (laŭ la propono de la subskribinto) fari riskan, paŝon kaj aranĝi publikan kolektadon de la subskriboj sub la peto al la urbestraro. Al la agado ekkomencita de Akad. Esper. Rondo ĉe J. A. H. aliĝis ĉiuj varsoviaj esperanto-organizaĵoj. Estis presitaj kelkmil folioj kun konforma peto al la urbestraro kaj loko por 50 subskriboj de plenaĝaj varsoviaj loĝantoj. Tiujn foliojn oni povis ricevi kaj plenumitajn fordoni en specialaj lokoj (bibliotekoj, organizaĵoj

k. t. p.). Kompreneble, ke en la gazetaro aperadis alvokoj kaj notajoj pri lo agado (ĉefe helpis la taggazeto „Nasz Przegląd"). Kaj post pli ol dumonata agado la 27-an de majo delegitaro konsistanta el ges-roj d-ro A. Czubryński (v-prezidanto de Pola Esp. Asocio), I. Dratwer (prezidanto de Ak. Esp. R. ĉe J. A. H.), H. Weinsztejn (ĝen. sekretario de Pola Esp. Stud. Soc.), J. Pomorski kaj E. Wiesenfeld, reprezentanta ĉiujn ok lokajn esperanto-organizaĵojn povis enmanigi al s-ro inĝ. Z. Słomiński, urbprezidanto, peton de la societoj kaj 23522 subskribojn de la plenaĝaj loĝantoj de Warszawa por alinomigi str. Dzikan je Zamenhofa, 22594 subskriboj formis belege tolbinditan volumon kun 597 folioj kaj ceteraj aldonan kajeron. Tio estas belega monumento al Zamenhof, malgraŭ la eventuala rea prokrastiĝo de la afero. **I. Dratwer.**

# IV. TUTPOLA KONGRESO DE ESPERANTO.

ŁÓDŹ, 20—21. IX. 1930

(Adreso de Loka Komitato: S-o J. Glicensztejn, Łódź, Zachodnia 54).

KOTIZO. Por ne malfaciligi la laborojn de la Kongresa Komitato ni tre petas ĉiujn partoprenontojn pri afabla laŭeble rapida alsendo de la kotizo zł. 5.— en letero rekom. aŭ per poŝtmandato.

Varsovianoj povas pagi la kotizon al s-o red. O. Bermann, dejoranta ĉiuĵaŭde en Varsovia Turista Societo, Ogrodowa No 8-a (telefono 342-55) inter 9—10 vespere, aŭ senpere al la Loka Komitato en Łódź.

GARANTIA KAPITALO. Por certigi la sukceson de l' kongreso estas starigita speciala garantia fondo, por kiu ni danke akceptas mondonacojn.

Ĝis nun pagis: s-o red. O. Bermann, Warszawa 25 zł.

FERVOJA RABATO. Reveturante el Łódź la kongresanoj ricevos 50 proc. fervojan rabaton.

KOMUNA LOĜEJO. La Urba Administracio kaj la Lerneja Inspektoro en Łódź afable disponigis al ni por la kongresaj tagoj komunan senpagan loĝejon por 60 personoj. Al la personoj, kiuj pli frue aliĝos, ni certigos la senpagan loĝadon.

Luprezo de hotelĉambroj estas proksimume la samaj, kiel en la tuta lando, do de 3 ĝis 9 zl. po tago.

TAGMANĜOJ. En la junia komuniko ni notis, ke la prezo de la komunaj tagmanĝoj estos ĉ. 3—4 zł. Kompreneble, ni atentigas, ke estas haveblaj ankaŭ tre malkaraj tagmanĝoj po 1.25 ĝis 2 zł.

PROVIZORA PROGRAMO.

SABATON, la 20/9. 1030.

9—12 Vizitado tra la urbo (grandfabrikejoj k. a.).
12.30 h. Komuna tagmanĝo.
15 h. Solena Malfermo en la Urbodomo.
17 h. Unua Kongresa Laborkunsido.
19 h. Komuna Vespermanĝo (laŭ deziro).
20.30 a. Kongresa Raŭto en salonoj de hotelo Manteuffel.

DIMANĈON, la 21-an de septembro 1930.

8.30 h. Diservo en Katedralo de St. Kostka.
10 h. II Kongresa Laborkunsido.
12 h. Komuna fotografado.
13 h. Komuna tagmanĝo.
15 h. Fakaj kunvenoj.
17 h. Fermo de la Kongreso.
20 h. Amika kunveno en parko Helenów aŭ kafejo Louvre.

LOKA KONGRESA KOMITATO:

Prezidanto: (—) D-ro J. Mędrkiewicz. Ĝen. Sekretario: (—) I. Lejzerowicz.

## KSIĘGA ADRESOWA ESPERANTYSTÓW POLSKICH.

Wobec zbliżającego się przyszłorocznego Międzynarodowego Kongresu Esperantystów w Krakowie Sekretarjat Rob. Stowarzyszenia Esp. „Praca-Laboro" w Warszawie podjął się w ścisłem porozumieniu i pod redakcyjną kontrolą „Polskiej Delegacji Esperanckiej", jako naczelnej reprezentacji ruchu esperanckiego w Polsce, przygotowania materjału i opracowania „Księgi adresowej esperantystów Polski" (Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj), wydawnictwa, które swym powszechnym, neutralnym charakterem ma się stać własnością ogółu esperantystów w Polsce, być wyrazem siły liczebnej naszego ruchu tak wobec kraju,

jak i zagranicy, oraz stanowić niezbędny materjał dla wszelkich dalszych poczynań organizacyjnych ruchu esperanckiego w Polsce.

Wobec tego prosimy usilnie **wszystkie** esperanckie organizacje, stowarzyszenia, kółka i grupy, jakoteż wszystkich kierowników kursów esp., o przysłanie w jak najkrótszym czasie, a najdalej do dnia 30 sierpnia 1930 r. na poniżej podany adres:

a) Wykazu wszystkich swoich członków wraz z dokładnemi adresami,
b) takiegoż wykazu swoich korespondentów (nieczłonków) i znajomych esperantystów-samouków, tych, co zakupili samouczki lub słowniki i wogóle osób, zainteresowanych lub wyraźnie sympatyzujących z ruchem esperanckim (każdy z tych wykazów oddzielnie).

Wszystkich zaś esperantystów, nienależących do żadnego stowarzyszenia, o podanie bezpośrednio swoich adresów prywatnych.

Na podane adresy będzie wysłana odnośna Odezwa wraz z Deklaracją, na zasadzie której dopiero dana osoba zdecyduje o zamieszczeniu lub niezamieszczeniu swego nazwiska w „Księdze Adresowej".

Wszelką korespondencję w tej sprawie prosimy kierować bezpośrednio na adres redakcji „Księgi" jak następuje:

**Jan Zawada, sekretarz „Laboro", WARSZAWA, Miasto-Ogród, Czerniaków, ul. Zaciszna 2.**

UWAGA! Cena książki wraz z bezpłatnem jednolinjowem zamieszczeniem adresu obliczona jest tylko na zł. 2.— w abonamencie z góry, wraz z przesyłką. Wpłaty uskuteczniać należy na ten sam, co wyżej adres **wyłącznie** przez P. K. O. Warszawa Nr. 20845.

# EL LA GAZETARO.

## NOVAJ LIBROJ.

**Plena Vortaro de Esperanto** verkita de Prof. E. Grosjean Maupin, A. Esselin. S. Grenkamp-Kornfeld, Prof. G. Waringhien, membroj de la Lingva Komitato 1930. Sennacieca Asocio Tutmonda 23 rue Boyer Paris XX. 10 markoj germ.

Por recenzo oni alsendis al la Redakcio 4 paĝojn. Laŭ unua aspekto estas vere ampleksa kaj kompleta vortaro, tre rekomendinda.

**Oficiala Jarlibro de U. E. A.** 1930 jam aperis kaj enhavas multajn interesajn detalojn pri la disvolviĝo de la Movado. Estas dezirinde, ke la libro aperu ĉiam tiel frue, eĉ pli frue.

La libro estas ĉiam tre interesa por ĉiu esperantisto. Ĝi enhavas kelkajn pliboniĝojn kontraŭ antaŭaj jaroj, sed por ni estas pli grave kompari la iom post iom progresantan disvolvon de la kompreno de la neceso de la lingvo por ĉiuj nacioj. Tiun komprenon ni rimarkas, kvankam la movado ne iras tiel rapide kiel ni dezirus.

# RICEVITAJ GAZETOJ.

Krom la gazetoj cititaj en la februara, marta kaj aprila numeroj de P. E. ni ricevis ankoraŭ la jenajn:

**Amiko** — monata gazeto por komencantaj esperantistoj; redaktas St. Malinowski, Chełmno, Biskupia 15, Pollando.

**La Juna Batalanto** — organo de la Internacia Katolika Junulara kaj Paca Movado, dumonata. Redakcio: Köln, Dagobertstrasse, 28, Germ.

**Kristana Revuo** — dumonata bulteno de la laboro de Dio tra la tuta mondo. Red.: F-ino F. H. Hanbury, „Antauen", Slewins, Lane, Hornchurch, Essex.

**Esperanto-Kiboŝa** — Eldonejo: Kiboŝa Espera Societo 458 Niŝiookubo **Tokio.**

**La Espero** — ĉiumonata gazeto, oficiala organo de Hankoa Esperanto-Asocio, P. O. Box 54, Hankow, China.

**Laborista Esperantisto** — organo de la federacio de laboristoj-esperantistoj, holanda. Red.: Middenweg 226, Amsterdam.

**La Verda Lumo** — monata gazeto. Adreso: P. O. Box 1332, Shanghai.

**La Ora Epoko** — ĵurnalo bazita je fakto, espero kaj kuraĝigo. Eldonejo: „La Ora Epoko", P. F. 100, Baden, Argovio, Svislando. Jare 8 zł. poŝtĉeka konto, Warszawa P. K. O. 191.481.

**Esperanto Lando.** Ofic. Organo de Universala Esperanto Fratulo. Jersey City. Esp. Asocio de la Nord Ameriko. Eldonanto J. J. Sussmuth.

Drukarnia L. Gronusia i S-ki w Krakowie, ul. Stolarska 6. Telefon 11018

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

## NOMARO DE DELEGITOJ EN POLUJO.

### ĈEFDELEGITO — J. ŜAPIRO, BIAŁYSTOK, LIPOWA 33.

1. ANDRYCHÓW. D. S. Monderer, dentkuracisto.
2. AUGUSTÓW. D. N. Warhaftig, komercisto, poŝtkesto 17.
3. BARANÓW n. Wieprz. D. B. Jóżwicki, instruisto.
4. BĘDZIN. D. A. M. Rozen, komercisto, Potockiego 1.
   VD. Jakobo Freiberger, oficisto, Browarna 3.
5. BIAŁA-PODLASKA. D. N. Rozmaryn, dentteknikisto, poŝtkesto 39.
6. BIAŁYSTOK. ĈD. J. Ŝapiro, ĵurnalisto, Lipowa 33.
7. BIELSKO na Śląsku. D. Dro J. Haas, dentkuracisto, Kolejowa 11.
   VD. S. Fränkel, fabrikisto, Starobielska 1.
8. BODZENTYN. D. St. Bogdanowicz, instruisto, poŝtkesto 10.
9. BOLECHÓW. D. A. Hoszowski, industriisto, No 340.
10. BRZEŚĆ n/B. D. Rajnoldo Vonago, juĝisto, Białostocka 35.
    VD. Michał Demidowicz, pensiulo, Sienkiewicza 10.
11. BYDGOSZCZ. D. Fr. Prengel, instruisto, Kościelna 1, II.
    VD. A. Pankratz, sejmdeputito, Matejki 7, II.
12. CEGŁÓW. D. Wł. Bucholc, pastro.
13. CIESZYN. D. Ludwik Krysta, ŝtata oficisto, Stary Targ 10.
14. CZARNY DUNAJEC. D. St. Pęksa, notario.
15. CZECHOWICE. D. St. Bigaj, instruisto, szkoła powszechna.
16. CZERSK. D. K. Majorkiewicz, instruisto.
17. CZĘSTOCHOWA. D. A. Karmioł, komercisto, Nowy Rynek 5.
18. CZORTKÓW. D. H. Oberländer v. Sternberg, Główna 95.
19. DĄBROWA-GÓRNICZA. D. J. Izraelewicz, laboristo, Królowej Jadwigi 32.
    VD. Cz. Rabenda, laboristo, Królowej Jadwigi 32.
20. DROHOBYCZ. D. J. Altman, oficisto, Garbarska 3.
21. GARWOLIN. D. Dro A. Czubryński, gimn. profesoro, Gimnazjum.
22. GRAJEWO. D. A. Gelfand, komercisto, Piłsudskiego 12.
23. GRODNO. D. A. Menczyński, instruisto, Zamkowa 7a m. 4.
24. HAJDUKI WIELKIE. D. M. Janik, tajloro.
25. JANÓW (Górny Śląsk). D. K. Kristek, elektrikisto, Zamkowa 2.
    VD. P. Mrochem, maŝinisto, ul. Mikołowska 4.
26. JAROSŁAW. D. A. Wachułka, instruisto.
27. KALISZ. D. A. L. Lasiński, ĵurnalisto, skrz. poczt. 149.
28. KAMIENICA POLSKA. D. A. Piltz, instruisto, No 87.
29. KARTUZY (Pomorze). D. Fr. Sielke, instruisto, Gdańska 23.
30. KATOWICE. D. J. Tichawski, fervoja oficisto, Plebiscytowa 25, III.
    VD. M. Kloss, priv. oficisto, Wawelska 3, II.
31. KIELCE. D. D. Frischman, studento, Czysta 31.
32. KNURÓW (Górny Śląsk). D. A. Pierchała, distilisto, Rybnicka 33.
    VD. W. Grzegorzyca, maŝinisto, Wilsona 15.
33. KOŁOMYJA. D. O. Kuzjma, gimn. profesoro, Nowa 6.
    VD. A. Karatnickyj, Jagiellońska 40.
34. KORZEC (Wołyń). D. F-ino F. Zawodnik, instruistino, Szkolna 10.
35. KRAKÓW. D. I. Wiesenberger, fabrikdirektoro, Powiśle 12.
    VD. F-ino R. Weinsberg, prokuristino, św. Anny 9.
36. KRZEMIENIEC. D. B. Doroszenko, instruisto, gimnazjum ukraińskie, Pocztowa 28.
37. KRÓLEWSKA HUTA. D. E. Kołodziej, muntisto, Mickiewicza 76.
    VD. H. Günzel, komercisto, ul. Wolności 90.
38. LESZNO p. BŁONIAMI. D. A. Furmanik, pastro.
39. LIDA. D. Andrzej Golachowski, arbara inĝeniero, Nadleśnictwo.
40. LUBANIA n. PILICĄ. D. J. Bulski, instruisto.
41. LUBLIN. D. Cz. Pruski, ŝtatoficisto, Konopnicka 8 m. 7.
42. LWÓW. D. Dro Izydor Fels, kuracisto, Słoneczna 1.
    VD. J. Kucharz, fervojisto, Na Błonie 54a.

43. ŁÓDŹ. D. Wł. Pfeiffer, libristo, Księgarnia Fiszera.
VD. I. Lejzerowicz, komercisto, Skwerowa 20.
44. ŁOMŻA. D. M. Perelman, dentkuracisto, Długa 7.
45. ŁUCK. D. Anatol Koch, ul. Wąska 9.
VD. I. Kanadiuk, oficisto, ul. Kumowska, dom Ogrodnika.
46. MILEJÓW. D. J. Fiszer, seruristo.
47. MYSŁOWICE. D. W. Jamrozy, flegisto, Oderskiego 3.
VD. I. Czypionka, hejtisto, Szabelnia No 10.
48. NADWÓRNA. D. R. Wulczek, oficisto, Kasa Chorych.
49. NOWOGRÓDEK. D. Inĝ. M. Chmieliński, ŝtatoficisto, Dyrekcja Robót Publicznych.
50. NOWA WILEJKA. D. L. Kozyro, fervojoficisto, Kościuszki 4.
51. OLKUSZ. D. A. Wajcman, komercisto, Krakowska 23.
52. OSTROŁĘKA. D. Dro J. Gutman, kuracisto, Kościuszki No 8.
53. PELPLIN. D. A. Troszyński, studento, Seminarjum Duchowne.
VD. P. Kalinowski, studento, Seminarjum Duchowne.
54. PŁOCK. D. F. Feldman, pastro, Dobrzyńska 27.
VD. S. Kon, studento, Tumska 9.
55. POZNAŃ. D. Dro St. Nowakowski, univers. profesoro, Wjazdowa 3.
VD. A. Okoniewski, tradukisto, Długa 4.
56. PROSZKOWICA. D. Jakobo Rozenblum, instruisto.
57. PRZEMYŚL. D. L. Blech, filozofia kandidato, Jagiellońska 6.
58. RADOM. D. J. Wojtas, tajloro, Ogrodowa 7.
VD. Fr. Wrzesień, konstruteknikisto, Podjazdowa 1/39.
59. RÓWNE. D. I. Zafrański, librotenisto, Sienna.
VD. M. Icekson, librotenisto, Jagiellońska 29.
60. ROŻDZIEŃ. D. T. Niedźwiedź, forĝisto, Piłsudskiego 18.
61. SIEDLCE. D. B. Żmuda, konstruisto, Prospektowa 20.
62. SIEMIANOWICE. D. St. Reichman, komercoficisto, Sienkiewicza 17.
63. SIERADZ. D. J. Sztulman, studento, Kaliska 5.
64. SOSNOWIEC. D. B. Czechowski, instruisto, „La Ornamo", str. Kościelna, Hale Targowe.
VD. F-ino G. Lewenhofówna, oficistino, Czysta 1.
65. STANISŁAWÓW. D. F-ino L. Karpen, oficistino, Kołłątaja 28.
VD. M. Gurawski, studento, Dąbrowskiego, dom kolejowy, drzwi 14
66. STASZÓW. D. M. Rizenberg-Czajowski, hotelposendanto, Krakowska 6.
67. STOCZEK ŁUKOWSKI. D. J. Poniatowski, instruisto.
68. STRYJ. D. S-ino E. Zimand, komercistedzino, Potockiego 5, I p.
VD. N. Steinberg, librotenisto, Szeroka 307.
69. STRZEMIESZYCE. D. R. Dobrzański, industriisto, Zakłady Wapienne.
70. ŚWIĘCIANY. D. A. Juchniewicz, ŝtatoficisto, ul. 11 Listopada 26.
VD. M. Stankiewicz, elektromuntisto, Jatkowa 7.
71. ŚWIECIE n. W. D. J. Zołnierek, ĝimn. profesoro, Dworcowa 38.
72. TARNOBRZEG. D. K. Mikosz, popola instruisto.
73. TARNÓW. D. F-ino I. Traum, lernantino de konservatorio, Bema 338.
74. TOMASZÓW MAZOWIECKI. D. Juljan Blay, komerca oficisto, św. Antoniego 17.
75. TORUŃ. D. Dro I. Dziedzic, advokato, Szeroka 43.
76. TUCZYŃ (Wołyń). D. F-ino L. Kornin, oficistino.
77. WARSZAWA. D. Wł. Miernicki, fotografisto, Marszałkowska 88.
78. WIELICZKA. D. Dro Z. Müller, juĝisto.
79. WIELUŃ. D. W. Janczurowicz, malliberejestro, Częstochowska 11.
80. WILNO. D. K. Gerŝater, banka fakestro, Piłsudskiego 23 m.
VD. R. Sakowicz, juristo, Krzywa 23.
81. WIŚNICZ. D. Dro I. Fragner, advokato.
82 WŁOCŁAWEK. D. Adam Szczygłowski, farmaciisto, pl. gen. Dąbrowskiego 1/12.
83. WOLBROM. D. T. Mitelman, bankgvidanto, Bank Kupiecki.
84. ZABIERZÓW. D. J. Fudro, kaldronisto, No 64.
85. ZAKOPANE. D. T. Kaciczak, komercisto, Kościelisko.
86. ŻÓŁKIEW. D. E. Hay, asekuristo.
87. ŻYCHLIN. D. Dro R. Sołoniewicz, kuracisto.
88. ŻYZNÓW. D. Br. Pruc, instruisto.

---

Drukarnia L. Gronusia i S-ki w Krakowie, ul. Stolarska 6, Telefon 1018.